


V- 19563/4



Skolto el

SUDANO

Socialisma Uniĝo de Polaj Studentaj
Studenta Scienco Esperanto - Rondo
str. 8-go Bydgoskiego Pułku Piechoty 9
PL 85-324 Bydgoszcz - Pollando

LA SKOLTA MONDO

OFICIALA ORGANO DE LA SKOLTA ESPERANTISTA LIGO

4 · A JARKVARONO 1971

VOLUMO 4
NUMERO 12

S * E * L

Fondinto: "Avoto"

Kunfondinto: J.W. Leslie

Honoraj Prezidantoj:

"Avoto". Norman Booth.

D.H. Davis. L.J. Van Gulck

Prezidanto: John Berggreen,
Brattvollveien 23 c,
Nordstrandhøgda, Norvegujo

Sekretario: J. K. Hammer,
Taxisstraat 7, Zaandam,
Nederlando.

Poŝtgirkonto 63 22 46.

Kasisto kaj Administranto de
"La Skolta Mondo":

David H. Withey, 21 Brook-
field Avenue, Waterloo,
Liverpool L 22 3YE, Britujo
Telefono WAT 2936

Redaktoro: Hans Amund Rosbach,
Nergata 37 c, N-6500
Kristiansund N, Norvegujo.

La Skolta Mondo aperas kvar-
foje en la jaro.

Okaze de mericevo, bonvolu
sciigi vian Nacian Reprezen-
tanton aŭ la Administranton.

pri ĝi, kaj eluzu ĝian materialon.

Eble la pli grava parto estas la korespondoanoncoj. Se vi uzas ilin vi ne nur havigas al vi mem ĝojn, vi ankaŭ kreas ĝojon al alilanda skolto, kaj donas al vi ambaŭ kaj al la amikaro de ambaŭ la pruvon, ke nia laboro ne estas vana.

Tamen, la frazo ne tute pravas. La gazeto ne estas la sola signo pri nia Ligo, kiun niaj membroj - la skoltoj en multaj landoj povas preni, teni kaj montri.

La lernolibro "La Ĵamborea Lingvo" estas same konkreta donaco al la multaj geknaboj, kiuj vulas inter-
nacion kunlaboron kaj gefreŝcon.

Ankoraŭ restas ekzempleroj el la unua eldono. Ni devas eluzi ankaŭ tiun!

Sed tiam ni devas vidi ankaŭ la ne videblajn rezultojn de la liga laboro:

La novan sintenon de la oficiala skoltmovado, i. a. sin esprimanta en la saluto de s-ro Laszlo Nagy al la Esperantokongreso.

La eblecojn, ĝis nun ne tro grandajn, al kontakto persona dum la internaciaj ĵamboreoj.

La unuajn signojn al oficialigo de la internacia lingvo dum monda aŭ nacia ĵamboreoj.

Ĉu ni komprenas la signojn?

LA SOLA

Mi ĵus ricevis leteron pri S.E.L. kaj nia gazeto. Kompreneble tia letero povas enhavi kaj laŭdon kaj kritikon, kaj mi ĉiam ĝojas pri tiaj eldiroj pri enhavokaj aranĝo de la materialo.


Sed la frazo, kiu nun kaptis mian atenton, diris:

"La Skolta Mondo" estas la sola rekompenco, kiun niaj anoj povas vidi. Kaj tial estas tre grave, ke ĝi regule aperadas.

Certe la revuo ne estas la sola rezulto el la celkonsciala laboro de la Centra Komitato aŭ de la Ligo, sed verŝajne ĝi momente estas la sola konkretaĵo, kiun niaj membroj povas preni per siaj du manoj kaj montri al amikoj kaj kamaradoj.

Sed dum estas tiel, uzu la gazeton kaj kunprenu ĝin al skoltaj kun-
venoj ktp., montru ĝin, rakontu

Ni ridetu



Ĝita el la vagonaro al Pittsburg . . .

LA VIZAĜON DE LA ĈIELO VI POVAS JUĜI

MATEO 16.3.

La vetero estas grava por ĉiu, precipe por skolto kiu vojaĝas aŭ tendumas. Estas multaj popularaj veterprognozoĵ, kiujn oni de generacio al generacio parkere memoras. Kelkaj el ili estas komuna havaĵo de diversaj popoloj, aliaj tamen nur por finnoj; ili estas observoj pri

veterŝanĝoj, studitaj dum longaj periodoj.

En Finnlando la veterŝanĝoj estas abruptaj, somero estas mallonga; des pli vigle kaj aktive la skolto sciemas, ĉu valoras morgaŭ eki la vagvojaĝon.

Jen SEPPŲ TELLA dividas kun ni la saĝon de prapatroj:

PLUVO KAJ MALBONA VETERO venos se

- la suno subiras en nubon
- la fumo surteriĝas
- la kokinoj treege vigle banas sin en koto
- anaso maltrenkvile subakviĝas en sia laĝeto
- araneo ne plektas retojn, sed restas en siaj ujoj
- burdoj, restantaj por tranokti en floroj, nur flegme movetas, se homo ilin tuŝas
- fringo raŭke ĉirpetas
- nigra pegokajgruo ĉiame blekas
- fiŝoj saltetas nivele de akvo
- vermoj streĉas sin
- formikoj fermas enirejojn de la amasoj.

LA KAJ SEKA VETERO fariĝos, se

- la sunleviĝo estas tute ruĝa
- frumatene regnas forta roso
- kuloj dancas vespere
- muŝoj kaj aliaj insektoj flugas malfrue post la sunsubiro
- akrido ĉirpas
- strigoj kriadas nokte
- vespertoj flugadas tien-reen dum vesperiĝo
- hirundoj alte flugas
- fringo goje kaj hele kantadas.

Venontnumere Seppo Tella dividas kun ni pli el sia scio - tiam pri la GRANDA URSO



MALVARMEGAN VINTRAN VETERON ni havos, se

- la Lakta Vojo estas klare vid-ebla
- longe pluvas de norde
- paŝo knaras sub ŝuo
- paseroj aŭ paruoj bekas sur la fenestron

Kaj jen la daŭrigo de la citaĵo, kiun ni uzis, kiel titolo:

... sed la signojn de la tempo vi ne povas.

Skolto emu al la kompreno ne nur de unu, sed de ambaŭ.

PAŝTI LE POROJN DE LA REĜO

Norvega popolfabelo
laŭ P Chr Asbjørnsen

Estis iam retiriginto kiu transdonis sian bienon al la plejaĝulo. Sed li havis ankoraŭ tri filojn, Per, Pål kaj Espen Cindrulo. Ili estis hejme sen ion fari, ili fartis tro bone kaj fidis tro bone pri si mem tiel ke nenio ŝajnis al ili sufiĉe bona.

Pine tamen Per eksciis, ke la reĝo serĉis paŝtiston por siaj leporoj, kaj li diris al sia patro, ke tien li iros, tio konvenas al li, neniam li servos al pli malaltranga ol la reĝo. La oldulo ja diris, ke certe troviĝas laboro pli konvena, ĉar paŝtisto de leporoj devas esti kaj rapida kaj malpeza kaj neniu sidemulo, ĉar kiam la leporoj ekkuras ja estos alio ol vagi inter la ĉambroj.

Nu, ne helpis, Per volis kaj Per devis, kaj jen prenis saket surnuken kaj ekpaŝis laŭ la deklivo, kaj kiam li jam estis irinta longen kaj pli ol tio, li alvenis al maljunega virinaĉo, kies nazo premiĝis en arboŝtumpo, kaj vidante kiel ŝi tiris kaj penis por liberigi, li komencis ridegi.

"Ne staru tie kaj ridaĉu," diris la virino, "sed venu kaj helpu maljunan kurbiĝintulon; mi volis haki brulaĵon, kaj jen la nazo fiksiĝis ĉi tie, kaj nun mi penadis kaj ne gustis manĝaĵeron dum centjaroj", ŝi diris.

Sed des pli Per ridegis, al li estis nur amuzo, kaj se ŝi staris tiel dum cent jaroj, ŝi certe povas stari ankoraŭ cent.

Kiam li alvenis al la reĝa bieno, ili akceptis lin paŝtisto tuj; ne estis malfacile ricevi oficon, kaj bonajn manĝaĵojn kaj salajron li ricevu, eble eĉa la reĝidino; sed se li perdus eĉ nur unu leporon, oni eltranĉos tri rimenojn el lia dorso por poste ĵeti lin en la serpentejon.

Dum Per estis en la proksimo de la bieno, la leporoj estis en unu aro, sed dum la tago pasis, kaj ili atingis al la arbaro, ili komencis salti kaj kuri laŭ ĉiuj deklivoj. Per sekvis kaj ekkuris laŭ sia povo dum li ankoraŭ povis vidi leporon, kaj dum la lasta malaperis, li apenaŭ povis spiri; poste li ne plu retrovis ilin.

En la posttagmezo li hejmeniris kaj staris ĉe la fendotrairejo, sed vane li staris kaj rigardis kaj serĉis. Ho ne, neniu leporo vidiĝis, sed reveninte al la reĝbieno li akceptiĝis de la reĝo kun tranĉilo en la mano, li eltranĉis la tri rimenojn, enigis salon kaj pipron en la vundojn kaj ĵetis lin en la serpentejon.

Tom poste Pål volis ekiri por paŝti la reĝan leporaron. La oldulo diris la samon al li, kaj eĉ pli, sed li devis iri kaj li volis iri, estis neniu helpo, kaj okazis same, ne pli bone, nek pli malbona ol li ol al Per. La virinaĉo staris tie kaj tiris kaj penis kun la nazo en la arboŝtupo, kaj li ridegis kaj trovis tion amuza, kaj lasis ŝin tie stari. Oficon li ricevis tuj, estis neniu malfacilaĵo. Sed la leporoj forkuris de li laŭ ĉiuj deklivoj, kvankam li kuregis tiel, ke li spirigis kaj kondutis kiel hundo en sunvarmego. Kaj kiam li venis al la reĝa bieno sen la leporoj, la reĝo staris sur la ŝtuparo kun la tranĉilo en la manoj, kaj eltranĉis la tri rimenojn, enigis salon kaj pipron en la vundojn, kaj jen li estis en la serpentejo.

Post ankoraŭ kelka tempo Cindrulo volis iri por peti oficon kiel la paŝtisto de reĝaj leporoj, kaj tion li diris al la patro; estus tiel konvena laboro por li, iri en arbaroj kaj kampoj laŭ lokoj kie beroj kreskas kaj paŝi kun aro de leporoj, kaj de tempo al tempo ripozi kaj dormeti kaj trankvili en la sunplenaj deklivoj.

La patro diris, ke certe estas pli konvena laboro; se ne pli malbone li sukcesos, li certe ne pli bone sukcesos ol la fratoj, kiu volas paŝti la leporojn de la reĝo, ne devas iri kvazaŭ li portus plumbajn

NE
STARU
TIE
KAJ
RIDAĈU
ŜI
DIRIS



pezilojn sur la piedoj aŭ kiel pediko en gudro, kiam tiuj ekkuros en la sunplenaĵoj deklivoj, estos same malfacile kiel kapti pulojn per la manoj en lanaj gantegoj, kaj kiu volas gardi sian dorsan, devas esti rapida kaj facila, kaj kuri pli rapide ol seka haŭto kaj birda flugilo.

Ne gravas, diris Espen Cindrulo; li volis al la reĝa bieno por servi sub la reĝo, sub iu sen tia rango li ne volas servi, li diris, kaj la leporojn li certe povos paŝti, ili apenaŭ povas esti pli malfacilaĵoj ol la bovidoĵoj kaj la kaprino. Kaj jen li prenis la saketon surdorsan kaj foriris.

Kiam li estis irina longen kaj pli ol tio, tielke li ekmalstategis, li venis al la maljuna virinaĉo kiu staris kun la nazo en la arbo-stumpo kaj tiris kaj penis kaj volis liberiĝi.

"Bonan tagon, avinjo", diris Cindrulo; "ĉu vi staras ĉi tie por ĝigi vian nazon, kompatinda malrektulino?" li diris.

"Nun neniu nomis min avino dum cent jaroj," diris la oldulino, "sed venu liberiĝi min, kaj donu iom por manĝi, ĉar mi neniam manĝis dum jena longa tempo; kaj poste mi avine helpos al vi," ŝi diris.

Jes, ŝi ja bezonas kaj manĝon kaj trinkaĵon, diris Espen.

Kaj jen li pecigis la arboŝtipon, ke ŝia nazo liberiĝu, kaj ambaŭ ekmanĝis, ĉar li donis al ŝi, kaj la virino havis apetiton, tion oni povas kompreni, kaj tiel ŝi formanĝis la pli grandan parton de la manĝaĵo.

Poste li donis al Cindrulo fajfilon, kiu estis tia, ke seli blouvus per unu fino, ĉio disiĝus, kion li deziris, kaj uzante la alian finon li povis rekunigi tion; kaj se li perdus la fajfilon, li ricevus ĝin nur per deziri tion. "Jen vere bona fajfilo", pensis Espen Cindrulo.

Kiam li venis al la reĝa bieno, ili akceptis lin paŝtisto tuj; ne estis malfacile ricevi oficon, manĝon kaj salajronli ricevos, kaj se li kapablas paŝti la leporojn de la reĝo sen perdi iun, li eble eĉ

ricevos la reĝidinojn; sed se malaperus iu, se eĉ nur leporido, oni tranĉos la tri ruĝajn rimenojn el lia dorso, kaj tiel certa la reĝo estis pri tio, ke li foriris por akriĝi sian tranĉilon.

Devas esti facila afero paŝti la leporojn, diris Espen Cindruĵo; ĉar forirante, ili estis kiel ŝafaro. Kaj dum ili estis proksime al la bieno, ili iris are kaj ope, sed kiam ili venis arbaren, kaj jam proksimiĝas la tagmezo, kaj la suno brilis kaj varmis, ili komencis salti kaj forkuri inter la deklibetoj.

"Ho, ho, ĉu vi povas forkuri!" vokis Espen Cindruĵo kaj fajfis per la unu fino de la fajfilo, kaj ili disiĝis ĉiudirekten. Sed kiam li venis al malnova karbistejo, li provis la alian finon, kaj antaŭ ol li povus tion pensi, la leporoj staris tie ope kaj surlinie, kaj li povis inspekti ilin kiel trupo da soldatoj sur ekzercejo. "Jen vere valora fajfilo," pensis Espen Cindruĵo. Kaj li ekdormetis en sunplena loko, kaj la leporoj gardis sin mem ĝis vesperiĝo; tiam li kunfajfis ilin kaj revenis kun ili kiel ŝafaro al la reĝa bieno.

La reĝo kaj la reĝino, eĉ la reĝidino, ili staris ĉe la ŝtuparo kaj miris pri tiu ulo, kiu paŝtis la leporojn kaj revenis kun ili, kaj li reĝo nombris kaj kalkulis kaj montris per la fingroj kaj denove kalkulis, sed mankis eĉ ne leporido. "Jen bona knabo" diris la princino.

La duan tagon li denove ekpaŝtis. Sed dum li kuŝis en berplena loko ili sendis al li la servistinojn de la reĝa bieno; ŝi devis eltrovi kiel li kapablis paŝti leporojn tiel bone.

Jes, li montris la fajfilon, kaj jen fajfis per unu fino, jen per la alia, kaj la leproj forkuris kaj revenis.

Stranga fajfilo, diris la servistino, ŝi volonte pagus cent talerojn por ĝi, se li volus vendi.

Jes, estas valora fajfilo, sed por mono li ne vendas. Sed se ŝi donus la cent talerojn kaj kison por ĉiu talero, ŝi ja ricevus ĝin.

Ho jes, tion ŝi volonte faros, li eĉ povas havi du kisojn kun ĉiu talero, kaj kun ili dankon.

Kaj tiel ŝi aĉetis la fajfilon. Sed kiam ŝi venis al la reĝa bieno, la fajfilo estis for, ĉar Espen Cindruĵo redeziris ĝin, kaj en la vespero li hejmenvenis kun la leporoj kiel ŝafaro, kaj kvankam la reĝo kalkulis multfoje, eĉ haro ne mankis.

La trian tagon ili sendis la princinojn, ke ŝi forlogu la fajfilon de li. Ŝi ŝajnis gaja kiel alaŭdo, kaj proponis du cent talerojn, se li volas vendi la fajfilon kaj rakonti kiel sukcese kunpreni ĝin hejmen.

Estas ja valora fajfilo, diris Espen Cindruĵo; kaj ĝi ne estas aĉetebla, li diris; sed kiel ajn, li vendu ĝin al ŝi, se ŝi pagus la du cent talerojn kun po unu kiso. Kaj se ŝi deziras havi ĝin, ŝi ja gardu ĝin bone. Tio estu ŝia propra afero.

Sajne tio estas alta prezo, laŭ la opinio de la princino, ŝi timis doni la kisojn; sed ĉi tie en la arbaro ja neniu nek vidas nek aŭdas do tamen - la fajfilon ŝi devas posedi, ŝi diris. Kaj kiam Espen ricevis kion li postulis, ŝi ricevis la fajfilon, kaj ŝi premis ĝin inter siaj fingroj. Sed kiam ŝi venis al la reĝbienoj kaj volis montri ĝin, ĝi tamen estis malaperinta de inter ŝiaj fingroj.

La sekvanta tagon la reĝino mem volis provi, kaj ŝi certe fidis pri la sukceso.

Ŝi estis pli avara, kaj ne proponis pli ol kvin dek talerojn, sed ŝi devis altigi la proponon ĝis tri cent. Cindruĵo diris, ke temas pri valora fajfilo, kaj ankoraŭ estas multe tro malalta propono, sed por ŝi li tamen volas akcepti, se ŝi aldonus ŝmackson al ĉiu talero. Kaj tion li ricevis, kaj eĉ pli, tiurilate ŝi ne avaris.

Ricevinte la fajfilon ŝi fiksnodis ĝin kaj kaŝis ĝin bone; tamen ŝi ne pli sukcesis ol la aliaj, ĉar kiam ŝi volis preni ĝin, ĝi estis for, kaj en la vespero Cindruĵo venis kun la leporoj de la reĝo kiel ŝafaro.

"Nenio taŭgas," diris la reĝo, "se mi ne mem faras ĝin. Kaj se iu povu forlogi la fajfilon, mi ja devas ankaŭ tion mem fari. Ne estas alia ebleco, mi komprenas." Kaj kiam Espen estis en la arbaro en la sekvanta tago, la reĝo sekvis, kaj trovis lin en la sama sunplena

deklivo, kie la virinoj provis persvadi lin.

Jes, ili estis amikoj kaj bone konsentis, kaj Espen montris la fajfilon al li, kaj fajfis jen per unu, jen per la alia fino, kaj ĝi ŝajnis al la reĝo stranga kaj havinda, eĉ se li devus pagi mil talerojn.

"Jes, tio estas valora fajfilo," diris Espen Cindrulo, "sed por mono mi ne vendas ĝin" li diris; "sed ĉu vi vidas la blankan ĉevalinon tie ĉe la granda pino?" li diris kaj montris al la arbaro.

"Jes, estas mia propra ĉevalo, estas Blanka," diris la reĝo, ĝin li certe mem povis rekonii.

"Jes, se vi donos al mi mil talerojn kaj kisos Blankan, la fajfilo estas via."

"Ĉu vi ne povas konsenti pri iu alia prezo?" diris la reĝo.

"Ne, neniu alia prezo," diris Espen.

"Sed mi do devas meti mian silkan poŝtukon sur la ĉevalon?" diris la reĝo.

Tion li rajtis, kaj jen li ricevis la fajfilon kaj metis ĝin en sian monujon, tiun li metis en la poŝon, kiun li butonumis, kaj post tio li revenis, sed kiam li volis retrovi la fajfilon, estis al li ne pli bone ol al la virinoj, li ne pli ol ili havis la fajfilon, kaj Espen Cindrulo revenis kun la leporaro, kaj ne haro mankis.

La reĝo estis kolera kaj furioza, ĉar Cindrulo trompis ilin ĉiuj kaj eĉ lin, kaj nun li perdis la vivon, pri tio ne plu estis dubo; kaj la reĝino diris la samon, tian trompiston oni senkapigu tuĵ.

Espen diris tion, ke estas nek ĝuste nek juste, ĉar li faris nur laŭ sia tasko, kaj gardis la dorson kaj vivon plej eble bone.

Tiam la reĝo mildiĝis: se li povus mensogi ĝis la granda bierbarelo pleniĝis ĝisrande, li savus la vivon.

Tio apenaŭ estis longdaŭra nek malfacila laboro, tion li bone kapablis, diris Espen Cindrulo. Kaj jen li komencis rakonti ekde la komenco; li rakontis pri la virinaĉo kun la nazo en la arbŝtampo, kaj de tempo al tempo li diris: "ion mi ja devas mensogi, se la barelo pleniĝu" Poste li preparolis la fajfilon, kaj pri la servistino, kiu venis al li kaj volis aĉeti ĝin por cent taleroj, kaj pri la kisoj, kiujn ŝi devis aldoni; poste pri la princino, kiel ŝi agrable kisis lin, ĉar neniu vidis nek aŭdis ilin, tie en la arbaro - "ion mi ja devas mensogi, se la barelo pleniĝu," diris Espen Cindrulo; tiam li rakontis pri la reĝino, kiom ŝi avaris pri mono, sed malavaris pri ŝmackisoj - "mi devas ion mensogi, se la barelo pleniĝu," diris Espen Cindrulo.

"Jam ĝi estas sufiĉe plena," diris la reĝo.

"Ho, ne," diris la reĝino.

Tiam li komencis rakonti, ke la reĝo venis al li, kaj pri la blanka ĉevalino - kaj se li volus havi la fajfilon, li devus - "jes, pardonu, ion mi devas mensogi, se la barelo pleniĝu," diris Espen Cindrulo.

"Haltu, haltu, ĝi ja plenas, knabo!" vokis la reĝo; "ĉu vi ne vidas ke ĝi estas super la rando!"

Tiam ŝajnis al la reĝo kaj la reĝino pli bone, ke li ricevu la reĝindionon kaj la duonon de la regno, nenio povis malhelpi tion.

"Jen, tio estis valora fajfilo," diris Espen Cindrulo.



La skolto estas gaja knabo aŭ knabino. En ĉiutaga laboro kaj ludo li kaj ŝi trovas plezuron kaj ĝojon. La infaneco rajtas esti tia.

Sed ne ĉiam estas!

Neniu povas vivi nun sen aŭdi pri mizero kaj malfeliĉo, tiuj trafas infanojn kaj plenkreskulojn - la mizero ne distingas.

Tial la unua vorto supre ne estas facila vorto nuntempe.

La aliaj du ne pli facilas. Infanoj kaj plenkreskuloj timas, tiuj eble pro etaĵoj kiaj mallumo, pro la pli fortaj "amikoj", aŭ pro iu tute konkreta afero. La plenkreskuloj havas tute aliajn kaŭzojn por la timo: Kio okazos en tiu ĉi mondo? Ĉu ni povos pluenvivi?

La du esprimojn ni trovas en kristnaska evangelio, la stranga kaj tre komata rakonto pri la infano naskita en stalo, sed reĝo de ĉielo kaj tero.

Multaj modernaj homoj ŝatas la rakon-



ton, sed trovas nenion valoran en ĝi, ekster la beleco kaj la tradicio.

Ili montras al nia mondo, kaj pridemandas la pacon profetitan.

Ili asertas, ke neniu dio ekzistas; la homo mem devas prizorgi la vivon kaj mem preni la respondecon.

Kaj ili vidas neniun eblecon vivi sen timo.

Ili pravas.

Se Dio ne ekzistas - se la Savanta ne estas naskita, ni apenaŭ povas esti tiel optimistaj, ke ni trovas bazon por vivo en ĝojo, kaj sen timo.

Se ni rigardas al ni mem, ni vidas homon kiu per sia inteligenteco kaj malsaĝo kreis mondon de teruro kaj malpureco

el kiu ni ne scias savon.

Tial ni ja povas diri, ke la evangelio estas sensenca al tiuj, kiuj ne kredas. Samtempe tio montras, kiom ĝi valoras al ĉiu fidanto:


Ĝoju! Savanto naskiĝis, la vivo estas plena da signifo, taskoj kaj valoroj Ĝoju! La Savanto forprenis la ŝarĝon de peko kaj ŝuldoj. Kaj ne timu! Neniu povas okazi al vi, kion Dio ne turnos al bono, eĉ funebro kaj doloro, eĉ la plej granda sufero iĝos benoj.

Ĉar eĉ la morton Li konkeris, eĉ morton vi ne bezonas timi ĉar ĝi iĝos eterna vivo.

Tio estas la evangelio. Ĉu mire, ke al kristanoj la kristnasko estas la festo de ĝojo?

Ĝoju! La Savanto naskiĝis por savo al ĉiu homo sur la tero.

Haro.



Ni prenis el "World Scouting" kelkajn bildojn el la Monda Jamboreo" en Japanujo.

La numero de "World Scouting" ankaŭ informas pri kvin-jara plano, kiun la 23.a mond-konferenco aprobis, kaj kies celo estas:

1. Kvalite plibonigi kaj ĝisdatigi la skoltismon.
2. Duoblige la membronombro ĝis 1980.
3. Krei ekonomian sendependecon por la skolta movado.

Ĉu la plano estas adoptebla por S.E.L.?

Ni ankaŭ trovas:

EUROPEAN FRIENDSHIP YEAR 72




ANNÉE EUROPÉENNE DE L'AMITIÉ 72

Oni diras:

"Internaciaj kontaktoj ne estas novaĵo en skoltismo. Jamboreoj el diversaj tipoj dum jaroj estis forumo, kie skoltoj renkontiĝis kaj interŝanĝis ideojn kaj spertojn. La celo dum 1972 estos ampleksigi tion kaj krei ne nur senton de unueco dum la okazo, sed konstrui ion pli profundan kaj daŭran."

Ni kredas, ke en tiu konstrua laboro, la internacia lingvo devus doni plej bonan ilon.

Tion ni povas diri al la M.O. kaj la naciaj aŭtoritatuloj ĉefe per prezentado de faktoj kiuj domkmentas, kiel la unu-sco sentigas en nia movado.



NOT

La unua noteto enhavu gratulon:


La N.R. de Belgujo s-ro Eddy Frederickx kaj la edzino Niki ricevis la unuan filinon, Veele, kaj mi tutkore gratulas la gepatrojn kaj deziras benon al la bebo.

TEJO kongresos 1972 en Torun, Pollando, de la 17.a al 23.a de Julio.

La jarfino alproksimiĝas, kaj la sekretario kaj la kasisto certe atendas raportojn kaj monon.

Por ke nia organizaĵo funkciu kiel eble plej bone, ni petas, ke la NR'oj sendu siajn raportojn en la komenco de la jaro, kun informoj pri membraro kaj pri agado.

La redaktoro gojus, se vi sendus kopion al li. El tiu li povus eltiri tion, ke "La Skolta Mondo" estus spegulo de la skolta mondo.



ETOJ

Al nia scio informiĝis pri la insigno de SEL:

La insigno estas kreita de s-ro C. D. A. Capp, kiu nun, post sia emeritiĝo, fervore laboras en la oficejo de B.E.A

Dum la Foiro de Leipzig okazos la 11-an de Marto Esperantista Renkontiĝo.



KORESPONDEMULOJ

Du skoltinoj, 13 jaraj, kiuj nun lernis mian lingvon, por la unua fojo volas korespondi en ĝi:

Carina SKAREBY
Fjällbogatan
14 H, S-415 07
Göteborg, Svedujo.

kaj

Suzanne BIVANU, Quartier Banunu no 27/d, Commune de Kinshasa- Matete, Rep. Dem. du Congo.

Nia peto:

Lasu ilin senti kaj sperti, ke nia lingvo kreas kontakton.

Nia konsilo:

Transdonu la nomojn ankaŭ al via nacia skoltgazeto, kun indiko, ke ili uzas Esperanton.

SEL'ANOJ

estas invitataj al malkaraj aĉetoj:

Mi povas havigi kelkajn (ne multajn) kovertetojn kun po 100 diversaj norvegaj poŝtmarkoj. Prezo: 4.- n. kr. - senpage alsendataj kondiĉe, ke la mendo estas filatel afrankita.

Baldaŭ mi eldonos libron kun literatura enhavo - tradukoj kaj originaloj. "El Propra kaj Fremda" estos 76-paĝa, kaj koston 22.- n.kr., sed SEL'anoj povas mendi rekte ĉe mi kaj pagi 17.- n.kr..

Same mi ankaŭ proponas mian libron "Cent Himnoj" favore prete al 7.- n.kr. anstataŭ 10.- n.kr., kaj "Preparoj al Diservo" al 9.- n.kr. anst. 12.- n.kr.

HANS AMUND ROSBACH

N-6500 KRISTIANSUND



Naciaj reprezentantoj:

- Aŭstralio: S-ro S.H. Milligan, 274 Mont Albert Rd., Surrey Hills, 3127 Victoria. Telefono WF 7948.
- Belgujo: S-ro Eddy Frederickx, Paasbloemstraat 31, B-2060 Merksem-Antwerpen. Poŝtĉekk. 9978.93. Tel. (03)4524.76.
L.J. van Gulck: telefono 03-3688.08.
Poŝtkonto Belga Skolta Esperanto-Sekretariato 327460.
- Brazilio: S-ro Euclides C. Soares, Av. Almirante Tamandare 979, Belem, Para.
- Eritujo: S-ro C. Bardsley, 42 Westbourne Street, Oldham, Lancs.
- Danlando: S-ro Asger Petersen, Blistrupsvej 8, DK-2610 Rødovre. Telefono 707157.
- Finnlando: S-ro Seppo Tella, 9 kp, SF-55950 Imatra 95. Telefono 954-51130.
- Francujo: Monsinjoro Patrick Truchemotte, 76 Rue Lombard, Bordeaux
- Hispanujo: S-ro Pedro Marqueta, Fern el Catolico 32, 5^o Izqda, Zaragoza. Telefono 25 20 44.
- Italujo: Prof. Franco Tulone, Via Frangipene 8, 92019 Sciacca, Agrigento. Telefono 21.198.
- Japanujo: S-ro Sinzo Sumiya, Daido Kagaku Sooti K.K. 16, Suekirotyo Kitatu, Osaka.
- Kanado: S-ro John H.F. Hoyle, Box 421, Forest Ont..
Helpa N.R.: S-ro Paul Ronald, 45, 10th Ave., Roxboro, Queb.
- Kongo: S-ro Paul Deloin Nzemba-Paku, B.P. 198, Limete, Kinshasa.
- Nederlando: S-ro J.K. Hammer, Taxusstraat 7, Zaandam. Telefono (02980)-66931. Poŝtkonto 63 22 46.
- Norvegujo: S-ro H.A. Rosbach, Nergt. 37c, N 6500 Kristiansund N. Tel (073)-77620. Poŝtkonto 8 03 04 13.
- Portugalujo: S-ro J.P. de Melo, Rua Jacinto Nunes 17-3^o Dt^o, Lisboa I
- Usono: S-ro H. William Beare, 1007 Chicago Blvd., San Antonio, Texas 8 15 39.

Informoj pri membreco.

*Enk landoj kun Nacia Sekcio:

Informigu ĉe la N.R. kaj pagu al li la landan kotizon.

Individuaj membroj: (Nur en landoj sen N.R. !)

Kotizo inkl.abono de LSM. por junuloj ĝis 18 jaraĵ:

Angla £ 0.40 (Ned.guldenoj 3.30)

Por pli-aĝuloj: £ 0.60 (Ned.guldenoj 5.00)


Subtenantoj : Minimume £ 0.60 a ŭ Ned.g. 5.00

Oni pagu al la kasisto, aŭ se necese al la sekretario.

Ĉiam bonvolu pagi vian kotizon antaŭ la unua de aprilo !



"ESTU PRETA"



Dum Londona kongreso: J.K.Hammer
en interparolo kun finnaj skoltoj
Mikko Haikala, Hannu kaj Timo
Kaijanranta. Fotis Seppo Tella.

La Skolta Mondo

Memoru la limtempon.

La datoj estas 1-a de Februaro, 1-a de Majo,
1-a de Augusto kaj 1-a de Novembro.



REDAKCIO: N-6500 KRISTIANSUND

